

# Francilia asocio, KomitatKunsido 18/09/21

La kunsido okazis je la 6a ptm, surloke en la sidejo

## Partopreno

- \* Michèle Abada-Simon (MAS) ĉeestas
- \* Pierre Gauthier (PG), vickasisto ĉeestas
- \* Marc Giraud (MG), prezidanto ĉeestas
- \* Didier Janot (DJ) sin ekskuzis
- \* Aurélien Lestage (AL) sin ekskuzis
- \* François Lo Jacomo (FLJ) sin ekskuzis
- \* Didier Loison (DL), kasisto ĉeestas
- \* Marielle Martin (MM) sin ekskuzis
- \* Laure Patas d'Illiers (LPI), sekretario ĉeestas
- \* Guillaume Vera-Navas (GVN) sin ekskuzis
- \* Frantz Vichot (FV) sin ekskuzis

## Antaŭa KK

La protokolo de la KK de la 04/06/21 estis aprobita kaj enretigita je

<https://esperanto.paris/komitat-kunsidoj>

## Septembraj salonoj

Multaj francilianoj deĵoris en la budo de Esperanto France dum la Homarfesto. Ĉirkaŭ 200€ da varoj estis venditaj. Dek du vizitantoj lasis sian retroŝtadreson por ricevi informojn pri kursoj, eventoj kaj agadoj de la franca kaj de la francilia asocioj.

DL kaj LPI deĵoris en budo dum la festo de asocioj de Parizo Centro.

14/09/21, DL prezentis Esperanton kun LPI en la Social Bar al 4 ĝis 10 gejunuloj. DL donacis al la Social Bar la libron "L'homme qui a défié Babel", videblan sur la bretaro kaj prunteprenebla de la klientoj.

Por venontaj budoj DL sugestas ke ni preparu afiŝojn pri nia asocio, kun 2 rapidrespondaj kodoj, unu pri nia retejo kaj unu al formularo por lasi sian nomon kaj aliĝi al nia dissendolisto.

## Malfermitaj pordoj

La evento okazis 18/09/21 posttagmeze. 12 vizitantoj venis. 5 novaj homoj lasis sian retroŝtadreson kaj informiĝis pri kursoj.

## Paĝmarkiloj

Ili estas en ŝranko maldekstre de la klasĉambro en la Ĉerizejo. Ni disdonos ilin en budoj (kiel la kalendaretoj) kaj en la libroservo [ĉu konsente kun Susanna?] (en libro aĉetita).

La paginto transdonu la fakturon al DL.

## Respondecoj pri agadoj (rememorigo)

Notu bone: iuj agadoj nun ne okazas, sed eble denove okazos

- \* Kursoj : MAS MG FLJ
- \* Agadoj kun Romo, legoklubo : MG
- \* Ludoj : AL kun JEFO
- \* Ekzamenoj : FLJ
- \* Esperanto kafejo: GVN
- \* Kulturaj vesperoj: LPI PG
- \* ĥoro : MG
- \* Prelegturneoj : FLJ

## Respondecoj pri informkanaloj (rememorigo)

La unua kanalo estas la retejo <https://esperanto.paris> la aliaj kanaloj reeĥas la informojn.

- \* Retejo DJ AL
- \* Facebook MG DL
- \* Twitter PG
- \* Dissendolisto amikaro LPI (MG)
- \* Telegram AL
- \* Amikumu PG
- \* Eventaservo MG
- \* Duolingo LPI
- \* Meet-Up DJ
- \* Esperanto-aktiv (postaj informoj) LPI
- \* informi la urbodomon por ĝia dissendolisto Ĉu DJ faras tion? Se ne, DL pretas fari

## Dissendolisto

Kiu administras la liston [esperanto-paris@googlegroups.com](mailto:esperanto-paris@googlegroups.com) ? Ĉu DJ?

Ĉu eblas fandigi kun nia dissendolisto [amikaro-francilio@googlegroups.com](mailto:amikaro-francilio@googlegroups.com) ?

## Oficialigo de la estraro

Kiu ricevas nun la mesaĝojn al [info@esperanto.paris](mailto:info@esperanto.paris) ? Ili estu sendataj al la estraranoj. Kiu povas fari tion?  
LPI devas krei oficialan protokolon de la lasta ĜA kaj marta KK por oficialigi la nunan estraron al la banko.

## Enketo

AL enketis en Telegramo, en la kanalo Francilio. Li demandis, ĉu la respondanto interesiĝus pri iaj agadoj de la asocio. Deko respondis. Jen la pozitivaj respondoj:

- \* ricevi informojn pri la eventoj en tiu kanalo: 100%
- \* partopreni ludojn ĉiumonate surloke: 60%
- \* partopreni kurson: 20%

\* partopreni kulturajn vesperojn: 56%

\* partopreni ateliero pri verkado: 22%

## **Kursoj**

Ekde oktobro okazos kursoj:

\* 1a nivelo kun MG, rete, marde vespere

\* 2a nivelo kun MG rete, marde vespere kaj kun MAS surloke, ĵaŭde vespere

\* 3a nivelo kun FLJ surloke, marde vespere

Prezo de reta kurso=0€

Prezo de surloka kurso=80€ (ekzistas rabatoj)

Ĉiukaze necesas krome pagi la aliĝon al *Esperanto-France*=39€ (ekzistas rabatoj)

## **Ekzamenoj**

Ĉu eblas anonci ekzamenojn en decembro? Ĉu rete? Se rete, la asocio ne organizas la ekzamenon mem, sed reklamas prie kaj helpas la studentojn prepariĝi.

## **Esperanto-kafejo**

Pikniko okazis en julio.

En septembro, esperanto-kafejo okazis en Social Bar kun pli ol 15 homoj. Esperanto-kafejo okazos ĉiumonate, la duan sabaton vespere, ĉiufoje en alia kafejo.

## **Espéranto café croissant**

Plu kontentige okazas.

## **Ĝemelaj urboj babilrondo kun la romanoj**

Plu okazos rete ĉiumonate, ĉiufoje kun anoj de alia eksterlanda urbo: Tokio, Seulo kaj Pekino.

## **Legoklubo**

Plu okazos rete, plurfoje dum la jaro, ĉiufoje pri alia legaĵo. La partoprenantoj antaŭe legu la libron.

Komence de 2022 ĝi temos pri *Solaris*. Interesatoj petu la libron al *Esperanto France* por ĝui komunan liveradon.

## **Kulturaj vesperoj**

Ekde oktobro okazos surloke, ĉiumonate, la 1a merkredo vespere (kaj eble la 3a). La venonta okazos la 6an de oktobro.

Prizorgos LPI kun PG kaj MP (Marianne Pierquin). Ankaŭ kun RF (Régis Fournier) se li konsentos.

Ĉiufoje alia temo, kelkfoje ateliero pri verkado. PG antaŭvidas krei filmetojn pri Parizo.

## **Aliaj regulaj agadoj**

\* Koruso: ne

- \* Ludtempoj: ĉu entute? ĉu surloke? ĉu rete kun eksterlandanoj?
- \* Turneoj de prelegantoj: nun ne eblas pro la kronviruso.

## Projektoj

La tuta listo de projektoj legeblas en la protokolo de la KK de la 29/01/21:

<https://esperanto.paris/IMG/pdf/2021-01-29.pdf>

- \* Ekspozicio pri Péraire: GVN
- \* Zamfesto, 11/12/21, organizota kun la fervojistoj (Sylviane Lafargue). La komitato konsentas pagi parton de la kostoj. DL zorgos pri la kafa paŭzo.

## Novaj ideoj

- \* Subvencioj: la urbo donas subvenciojn al projektoj de parizaj asocioj. Ĝi proponas prelegojn pri kiel peti la subvenciojn. Neniu volentas prizorgi tion.
- \* Kursoj por ni mem: la urbo proponas al la asocioj kursojn pri diversaj spertoj: sociaj retoj, krei filmetojn, mastrumi asocion, ktp. Neniu deziras sekvi kursojn.
- \* Junaj volontuloj: Marion Quenut (Tuluzo) spertas pri tio kaj pretas helpi asociojn por havi junajn volontulojn pagitaj de naciaj aŭ eŭropaj rimedoj (volontula servo, Erasmus+...). Ĉu iu interesiĝas? PG rigardos la temon

## Venonta KK

KK okazas trimestre.

La venonta KK okazos surloke la 3an de decembro je la 6a ptm.

Tiam ni organizos la reĝkukon en januaro kaj la ĝeneralan asembleon dum la printempo 2022.

FINO DE LA KK